

& Ho katenoj, vi katenoj:

< Ripete 12 el 37 batoj por strofo, entute 185 paŝoj dum 3 minutoj. Rusa popolmelodio. Verkis "Stefan".>

(#Melodio:

<:37> (/So3So do oTi re3do do Ti; So3So fa are so3re mi i;

(do3do la aso fa3la so mi; So3So mi ire fa3Ti do o;)×

h)×8)+

(& Strofoj:

'1 /Jen leviĝas hela suno, ; Jen subiras
hela sun'. ; En malliberej' sen lumo ;
Por la frat' mi sidas nun. ; En
malliberej' sen lumo ; Por la frat' mi
sidas nun.

'2 Ho, vi korvo, korvo nigra, ; Ĉu
atendas min arest'? (; De l' malliberej'
formigru ; Vi al via alta nest'!)×

'3 Vi fantome profetkriu ; Laŭte ĝis la
mondorand' (; Al ekspluatataj kapoj ;
Pri la fin' de l' burĝa band'.)×

'4 Vi de l' sango rusta fero ; De l'
malliberul' fratin' (; Forte volas mi
liberon ; Sed katen' turmentas min.)×

'5 Ho, vi muroj, muroj grizaj, ; Venos
ja oktobra ond'. (; Jam laborularo disa ;
Unuiĝas en tutmond'!)×)